# HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Esperanto, Internacia lingvo



**La salmonteto en Egerszalók**

4
---------- 60-a jarkolekto
2016

**HUNGARA FERVOJISTA MONDO**
**Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado en Hungario**
**Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.**
..........................................................................
**Respondeca redaktoro:**
**István Gulyás**
**Eldonas:**
**Hungara Fervojista Esperanto-Asocio**
**Hungara Sekcio**
**de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio**
**Poŝta adreso: HU-1155 Budapest**
**Rákos út 98. I/9.**
**Aperas kvaronjare**
**Abonprezo: al hungara adreso: HUF 2000**
**al eksterlanda adreso: EUR 12**
*
**MAGYAR VASUTAS VILÁG**
**A magyar eszperantista vasutasok központi lapja**
**Felelős szerkesztő: Gulyás István**
**Kiadásért felelős**
**A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület**
**„Szkenguru" Nyomda Budapest**
**Felelős vezető: Balla László**
..........................................................................
**ISSN 0230-323x**
..........................................................................

## ENHAVTABELO:


| | |
|---|---|
| **62. I. Gulyás**: | Kiel ni laboras? |
| **63. I. Gulyás**: | Gardo de la valoroj |
| **64. I. Gulyás:** | Aŭtuna estrarkunsido de HFEA |
| **65. E. Dudich:** | Jubilea jaro de D-ro Kálmán Kalocsay |
| **66. M. Zuberecz:** | La 49-a konferenco de ILEI |
| **68. D-ro C. Klave:** | La 20-a IMEK |
| **70. I. Gulyás:** | Kuracaj akvoj en Hungario (Tria parto) |
| **77. J. Tomíšek:** | El fervoja mondo |


**60-a jaro N-ro 4, OKTOBRO-DECEMBRO**

# KIEL NI LABORAS?

Per la honesta laboro oni certigas la vivtenon por si mem kaj por sia familio. La laboro kreas valoron kaj ankaŭ mem estas valoro, kio nobligas la homan vivon. Facila estas troigi per la kvanto de la laboro, kaj ankaŭ per la celo de tiu. La nesatigebleco ankaŭ instigas la homon, kiu volas posedi kaj akiri senĉese plurajn valorojn eĉ prezojn. Unue la homo kolektas nur al si mem, poste al siaj geknaboj (ekz. konstruigi loĝdomon, aĉeti aŭtomobilon k.a.), poste la homo sentas devon doni ĉion al la genepoj ktp. En la sciurrado de la laboro rotacias la homo, kaj li/ŝi pensas, ke poste li/ŝi haltos, kaj li/ŝi havos eblecon tiam ripozi. Efektive tiam jam estos malfrua.
Ni havas proverbon: „La maŭro faris sian devon, la maŭro povas foriri", aŭ alie: „Plenumita via ofico, nun pasis via vico". Ni ne faru tion!!!

Alia proverbo: „Kiu kaptas tro vaste, konservas malmulte". Tiun labor-metodon ni povas sperti en la kadro de la Esperanto-movado. Pro tio multaj esperantistoj entreprenas ĉiun taskon, sed ili ne povas plenumi, eĉ nek unu taskon. Ili ekkapas kaj komencas en ĉiuj taskoj, sed ili ne povas fini tiujn. La laborplanon entuziasme akceptas la membraro dum la ĝenerala kunsido, sed dumjare ĉiuj neglektas tion, ĉiuj atendas la realigon de aliuloj. Tiuj estas la problemoj, kaj tiujn problemojn ni devus solvi komune, kaj tiel ni povas altigi la reputacion de Esperanto.

Do ni laboru kaj agadu racie, kaj saĝe, ni entreprenu tiom da taskoj kaj laboroj, kion ni kapablas kaj povas plenumi.

**István Gulyás**

# GARDO DE LA VALOROJ

## (PENSIGAJ PENSOJ)

Niaj antaŭuloj multe agadis por Esperanto. Se estis bezonata ili persistis por la lingvo en tiuj periodoj, kiam la ŝtato aŭ aliaj organoj kaj homoj persekutis la esperantistojn. La entuziasmaj agadoj de niaj antaŭuloj rezultigis kontinuan evoluon de Esperanto, kaj tiu disvastiĝis en la tuta mondo, kaj akiris honoron. Ankaŭ ni havas respondecon pri tiuj principoj, kaj ni ne havas rajton liberigi nin de la respondeco. La rezulto donas al niaj posteuloj rozkoloran estontecon.

La honesteco, lojaleco, la valoro de la agado sur la tereno de la Esperanto-movado senŝanĝe estas valida, sendepende de eraoj kaj cirkonstancoj. Kio estis valoraj kaj kernaj en la vivoj de niaj antaŭuloj, ankaŭ nun estas samvaloraj. Malgraŭ la diferencoj kaj malsamaj politikaj, ideologiaj aŭ mondkonceptaj opinioj, tiuj principoj estas homaj validoj. Ne estas maldekstra aŭ dekstra honesteco, ne estas konservativa aŭ liberala opinidiferenco, nur estas honestaj kaj malhonestaj homoj, kiuj efektive aŭ nur ŝajne volas agadi por Esperanto. Ni devas atenti unu la alian, ni devas respekti ies konsilojn, kaj ni devas batali por ĉefideo kaj valoro de la Esperanto-movado. Ni devas estimi kaj apreci ĉiujn aktivecojn, kiuj kunligas la esperantistojn. Ni rajtas diskuti kaj debati, sed neniam disputi kaj kvereli por Esperanto.

Mi ĉiutage legas la retmesaĝojn, kiujn sendas unu al aliaj la komitatanoj kaj estraranoj de UEA, TEJO kaj aliaj organozaĵoj, kaj estas malbona afero, ke multaj el ili estas senpaciencaj kaj malĝentilaj, la opinioj estas malsamaj, kaj pro tio okazas preskaŭ kvereloj. Se per tiuj malsamaj opinioj la Esperanto-movado antaŭeniras, progresas, ja okazu tio, sed superflue disputi ne kunportas la pretenditajn rezultojn. La aroganteco, kio fluas abunde, la negativa tono kaj stilo de la labormaniero en la kadro de UEA, la impulsiĝemo, hastemo kaj ignoremo venenas la atmosferojn kaj malbonigas la interrilatojn. La estonteco de la Esperanto-movado dependas de nia laboro. Ni ne ĝojigu per tiuj kondutoj al tiuj homoj, kiuj daŭre atakas la Esperanton, sed ĝojigu la bonintencajn kaj entuziasmajn esperantistojn per efikaj kunagadoj kaj per honoro de unu la alia. La estraro kaj komitato de UEA, kaj ĉiuj ĉefoj de la Esperanto-agado donu ekzemplon pri la sukcesaj kunlaboradoj. Per tiu labormaniero ni povas agadi laŭcele kaj efike, kaj tiel ni povas altigi la reputacion kaj rekonon de Esperanto.

Finiĝis la 68-a IFEF-kongreso, kaj ankaŭ la 101-a Universala kongreso. Ni ricevis pozitivajn kaj negativajn influojn. Ni forgesu la negativaĵojn, kaj gardu la pozitivaĵojn. Mi legis multajn retmesaĝojn, artikolojn, polemikojn en la kadro de la Esperanto-movado, kaj mi povas konkludi pri la serioza kaj malserioza agado. Laŭ mia opinio, ni devas montri al la skeptika mondo, ke nia ŝatata Esperanto estas vivanta kaj evoluanta lingvo eĉ movado, kaj la esperantistoj en la tuta mondo apartenas al granda familio, kaj agadas por Esperanto eĉ unu por la aliaj.

Ni gardu la valorojn, kiujn niaj antaŭuloj lasis al ni, tiujn heredaĵojn, kiuj certigas la estonton de Esperanto, kaj ankaŭ ni lasu valorajn heredaĵojn al niaj posteuloj!

**István Gulyás**

# AŬTUNA ESTRARKUNSIDO DE HFEA



La rezidejo de HEA

La estraro de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio (HFEA) la 5-an de oktobro 2016 kunsidis en la rezidejo de la Hungaria Esperanto-Asocio. Partoprenis el la trimembra estraro du estraranoj (D-ro József Halász pro malsano mankis), la trimembra Kontrola Komitato kaj unu gasto.
La estraro traktis ses tagordpunktojn. Unue la prezidanto raportis pri la laboro de la asocio laŭ la „Agadplano”. Laŭ tio kelkaj punktoj:

- El la planitaj du cirkuleroj estis dissendita unu, la duan eldonos la sekretario kune kun la protokolo de la nuna estrarkunsido;
- La planitaj du estrarkunsidoj okazigas per la nuna estrarkunsido;
- Pri la lingvoinstruado devos detale fari raporton al la ĝenerala kunsido, por ke ni precize sciu la rezulton de la instruado;
- En la kadro de la laborgupoj kaj komisionoj de IFEF kelkaj niaj membroj aktive agadas;
- La jarraporton pri la 2015-jara agado de nia asocio ni sendis ĝis la limdato al IFEF;
- Estas granda rezulto, ke – malgraŭ la financaj malfacilaĵoj – nia faka revuo Hungara Fervojista Mondo (HFM) aperadas regule kaj interrete, kaj papere;
- La buĝeto de nia asocio enhavas 300 mil Forintojn, kiel enspezo de la landa asocio de FISAIC. Bedaŭrinde ni ricevis ĝis nun nur 100 mil Forintojn, pro tio kelkajn planitajn taskojn ni ne povos realigi;



Dum la estrarkunsido

- La interrilaton kun la fakgrupoj kaj membroasocioj devas plibonigi. Pro tio la estraro decidis pri la respondecaj estraranoj kaj membroj de la Kontrola Komitato. Laŭ tio:
    1. Kelebia, Pécs……………….… István Gulyás,
    2. Tata, Győr, Budapest…… . D-ro József Bacsárdi,
    3. Szombathely……………….. .D-ro Imre Ferenczy,
    4. Nyíregyháza………………... D-ro József Halász,
    5. Miskolc………………………Miklós Zuberecz,
    6. Zalaegerszeg………………. István Sutka.

La estraro decidis ankoraŭ pri la bindaĵo de HFM numeroj de la jaroj 1991-2015. Ankaŭ decidis la estraranoj pri la historio de nia asocio, kiun devas finpretigi, kaj poste presi, se niaj financaj eblecoj ebligas.


D-ro Bacsárdi, Sutka, Gulyás, D-ro Ferenczy

En la kadro de la dua, tria, kvara kaj kvina tagorpunktoj la estraro ricevis iomete detalan raporton pri

- la 101-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en la slovaka urbo Nitra. Pri la kongresaj eventoj D-ro József Halász skribe raportis. Tiu raporto aperis en la 3/2016 HFM;
- la 68-a IFEF-Kongreso, kiu okazis en la bulgara havenurbo Varna. Pri tiu kongreso nia prezidanto skribis detalan artikolon – kiun kompletigis István Sutka - kiu aperis en la 2/2016 HFM;
- la 49-a ILEI-Konferenco, kiu okazis en la urbo Nyíregyháza, kiun organizis nia membroasocio „Verda Stelo" de Nyíregyháza. Pri tiu konferenco Miklós Zuberecz faris raporton, kiu aperas en la nuna numero de HFM.
- la 20-a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco (IMEK), kiu okazis en Nitra, rekte antaŭ la UK. Pri la konferenco sendis raporton la prezidanto de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), kiun raporton la honora prezidanto de UMEA D-ro Imre Ferenczy kompletigis, kaj tiu artikolo aperas en la nuna numero de HFM.

En la kadro de la lasta tagordpunkto la estraro decidis pri la tempolimo de la sekva ĝenerala kunsido. Laŭ tio la kunsido okazos en la unua semajnfino (sabate) de marto 2017. Okazis traktado pri la sekva IFEF-Kongreso, okazonta en la belega franca urbo Colmar, inter la 16-a kaj 23-a de majo 2017. La partoprenantoj parolis ankoraŭ pri la 2017-jaraj planoj kaj aliaj movadaj temoj.

**István Gulyás**

# JUBILEA JARO DE D-ro KÁLMÁN KALOCSAY

La iaman ĉefkuraciston de la budapeŝta infektologia hospitalo „Sankta Ladislao" estas respektata kiel eksterordinara personeco de la esperanta lingvo kaj kulturo. Ni citu kelkajn gravajn staciojn de lia riĉa esperantista vivo.
Li naskiĝis antaŭ 125 jarojn, en 1891 en la vilaĝo Abaújszántó. Dudek jarojn aĝa li konatiĝis kun Esperanto. Dum la unua mondmilito li absolvis frontoservon, tamen daŭrigante la medicinistajn studojn.
Antaŭ 100 jaroj, en majo de 1916, li ricevis kuracistan diplomon. Antaŭ 90 jaroj, en 1926 li jam estis adjunkto en la Sankta Ladislao Hospitalo. Dume li skribis poemojn. Unua volumo de liaj poemoj aperis en 1921 (*Mondo kaj Koro*). Post dek jaroj sekvis la volumo *Streĉita Kordo.* Li estis unu el la ĉefaj personecoj de la „Budapeŝta Skolo" de la Esperanto-beletro. Li nelacigeble tradukadis, entute el 30 (!) lingvoj.
Li forpasis antaŭ 40 jaroj. Sed eĉ 5 jarojn post lia morto aperis kompilita volumo prizorgata de la „Kalocsay Kálmán Amika Societo" per Ada Csiszár.
Li ripozas en la Vrangel familia kripto de lia edzino en Máriabesnyő. Lian memoron flegas la „Király Lajos Esperanto Amika Societo" de Miskolc, organizante literaturajn memorkunvenojn en la Memorĉambro aranĝita en la loka historia muzeo de lia naskiĝloko la urbo Abaújszántó.

**Endre Dudich**

# LA 49-A KONFERENCO DE ILEI

La 49-a ILEI-konferenco okazis inter la 30-a de julio kaj 6-a de aŭgusto 2016 en la hungara urbo Nyíregyháza. En la lasta 48-a ILEI-konferenco s-ino Sereghy Enikő Zengő proponis organizi la 49-a konferencon en la hungara urbo Nyíregyháza, kion kun granda ĝojo akceptis la konferenco. Jam en la jaro 2015 komenciĝis la preparlaboro. Grava paŝo okazis en septembro, kiam s-ro Radojica Petrovic, reprezentanto de ILEI vizitis la urbon por ekkoni la preparlaboron. Li faris viziton en la Universitato de Nyíregyháza, kiu estis la konferencejo, ĉe la tranoktejo kaj li ekzamenis ĉiujn cirkonstancojn. Dum la vizito estis konfirmigitaj la programoj kaj elektiĝis respondeculojn de diversaj programeroj. La LKK-anoj estis membroj de la Fervojista Esperanto-Asocio „Verda Stelo" Nyíregyháza. La LKK-anoj daŭre interrilatis kun Petrovic ĝis la komenco de la konferenco.




*Partoprenantoj de la 49-a ILEI- konferenco*

Antaŭ la konferenco okazis la 101-a Universala Kongreso de Esperanto en la slovaka urbo Nitra. En la kadro de la UK estis inaŭgurita la „Jaro de la Lernanto", kiu estas strategia projekto por plibonigi la edukan kaj instruadan laboron en la nuna reta epoko. UEA kaj ILEI kune laboras por realigi la projekton, kiun grave helpas la nomumita labor-grupo por la „Jaro".

La alia grava evento rilate al ILEI estis en Nitra, kiam la premio Deguĉi estis aljuĝita al la prezidantino de ILEI – s-ino Mireille Grosjean – pro multjara agado konforme kun la celaro de la premio.

Faciligi la vojaĝon al la ILEI-konferenco el Nitra, la LKK organizis hungaran aŭtobuson, kiu en la ferma sabato de la Universala Kongreso transportis konferencanojn rekte de la UK al la konferencejo de Nyíregyháza.

La ILEI-konferenco en Nyíregyháza – kie partoprenis 120 personoj el 29 landoj – komenciĝis sabate vespere kun la „Interkona Vespero". Dum la vespero okazis interesa kulturprogramo.

Dimanĉe okazis la „Solena Malfermo", kie partoprenis gastoj el la loka departemento, Hungaria Esperanto-Asocio kaj aliaj invititaj personoj, kiuj salutis la konferencon. Inter la salutleteroj oni laŭtlegis la leteron de la hungaraj fervojistaj esperantistoj, sendita de s-ro István Gulyás, prezidanto de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio, jene:

*„ Estimataj gesamideanoj!*

*Okaze de la 49-a ILEI-konferenco mi salutas vin en la nomo de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio.*

*Mi ege ĝojas, ke tiu grava konferenco okazas en belega regiono de Hungario, kaj la partoprenantoj povas ekkoni la hungarecan gastamon. La organizanto estas la „Verda Stelo" Esperanto-Asocio, kiu estas nia membroasocio, kaj mi estas fiera, ke ili entreprenis, kaj plenumas tiun malfacilan taskon. Pere de ĉi tiu konferenco ni agadas laŭ la „Kunlabora Interkonsento", kiu estis ligita inter nia internacia federacio IFEF kaj ILEI.*

*La organizo ILEI estas unu el la plej gravaj fakaj asocioj de UEA, ja la lingvoinstruado estas la plej signifa aktiveco en la kadro de la Esperanto-movado. Precipe nun, en la*

*komenco de la „Jaro de la Lernanto", kiam ILEI devas determini la celojn, strategiojn kaj kunlaboron sur tiu tereno.*
*Al tiu laboro mi deziras rezultohavan kaj efikan konferencon, kaj agrablan restadon en Nyíregyháza.*
*Budapest, la 22-a de julio 2016.*
*Kun sinceraj salutoj: István Gulyás*
*Prezidanto de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio,*
*honora membro de IFEF."*




LKK-anoj en la konferenco

La programo de la konferenco estis riĉa kaj varia. Ĉiutage okazis diversaj prelegoj, lingvo-kursoj por komencantoj kaj progresantoj, kiuj en la fino de la kursoj ricevis atestilojn. Okazis instruista trejnado, simpozio, komitatkunsidoj, lingva festivalo kun pli ol 20 lingvoj. Tri temoj konsistigis apartan fokuson en la konferenco: universitata aga-do, Esperanto en lernejojn kaj Esperanto-centroj, kiuj temoj restos en la centraj pripensoj de ILEI.
Okazis duontaga ekskurso, en kies kadro la partoprenantoj faris urborigardon en la urbocentro, en la ripozloko Sóstó kaj en la fabriko de Lego-brikoj. La tuttaga ekskurso okazis marde. La ĉeestantoj vizitis la vinregionon Tokaj helpe de s-ro Győző Gaál, kiu entuziasme kaj fakscie prezentis la vidindaĵojn, historiajn monumentojn, kulturajn valorojn. La plej interesa estis la vizito en urbeto Abaújszántó, kie troveblas la memorĉambro de la genia esperantisto D-ro Kálmán Kalocsay. La partoprenantoj florkronadis la memorstatuton de Kalocsay, kaj same kiel en lianoma strato la memortabulon. La urbestro de Abaújszántó akceptis la esperantistojn, kaj regalis ilin per aperitivo. Okazis vizito al la sinagogo de urbeto Mád, al la ĉokoladfabriko en urbo Szerencs, kaj fine en la vinkelo de urbeto Tarcal kun vingustumado.
Ĵaŭde okazis bankedo en la restoracio „Kemencés" kun riĉa kultura programo, bongusta hungareca vespermanĝo, muziko kaj dancado.
Vendrede okazis la „Adiaŭa Vespero" kun kulturprogramo, en kies kadro la popoldancgrupo „Szabolcs" prezentis hungarajn popoldancojn, eĉ dancigis la partoprenantojn.

En la kadro de la „Fermo de la Konferenco" la prezidantino de ILEI taksis la rezultojn de la konferenco, dankis la sindonan kaj elstaran laboron de la lokaj organizantoj. Ŝi anoncis, ke ekde la 50-a aranĝo de ILEI, anstataŭ la „Konferenco" la aranĝo nomiĝos „Kongreso". Tiu jubilea kongreso okazos ĝuste antaŭ la 102-a Universala Kongreso de Esperanto en la suda parto de Sud-Koreio, en urbo Busan, kiu estas granda havenurbo kun 3,7 milionoj da loĝantoj.

Post la fermo ankoraŭ dum du tagoj kunsidis la estraro de ILEI, kiam la plej grava temo estis la „Perspektivoj de ILEI".

**Miklós Zuberecz**

# La 20-a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco (IMEK)

La konferenco okazis la 20-an ĝis 22-an de julio 2016 en Slovakio, en urbo Nitra en la universitata hospitalo “Fakultná nemocnica Nitra”.
Sub la titolo “Medicinistoj kaj tutmondiĝo – kiajn medicinistojn bezonas la nuna jarcento?” Tridektri medicinistoj el Aŭstrio, Belgio, Finnlando, Germanio, Hungario, Kroatio, Pollando, Rumanio, Slovakio, Ukrainio kaj la Hinda Unio renkontiĝis kadre de la 20-a jubilea IMEK en la prelegejo de la “Fakultná nemocnica Nitra”.
La konferenco estis preparita en perfekta kunlaboro de la kuracistaj kolegoj de la hospitalo en Nitro, reprezentitaj de la ĉefkuracisto de la departemento pri onkologio, D-ro Juraj Detvay, Teodoro Rosinsky, Honora Membro de la UMEA, la UMEA-estraro kaj Jozefo Reinvart, ano de la kongreskomitato de la 101-a Universala Kongreso en Nitro, kies malferma akompana aranĝo la 20-a IMEK estis. Impona por ĉiuj konferencanoj estis la granda gastamo kaj afableco de la slovakaj gastigantoj. La modela agadmaniero, transpasante la eŭropajn landlimojn por faciligi kaj progresigi la internacian medicinan kunlaboron, estis honorigita per dankdiplomoj de la UMEA kaj kuracista asocio de la germana urbo Trier, kie la centra oficejo de la UMEA nuntempe estas situita.
La IMEK estis forte apogita de la memhelporganizo OZ NitraOnko, kiu dum la konferenco informis pri sia agado.
Alta protektanto de la konferenco estis D-ro Vytenis Andriukaitis, EU-komisionano pri sano, mem kirurgo kaj esperantisto, kiu honorigis la konferencanojn kun salutletero.
Tomáš Drucker, Ministro de Sano de Slovakio, transprenis aŭspicion sur la jubilea IMEK. Ŝtata sekretario de la Ministerio de Sano de Slovakio, profesoro Stanislav Ŝpanik, persone venis al la solena malfermo por saluti la konferencanojn nome de la ministro.
Ankaŭ venis al la solena malfermo kun trafaj salutvortoj D-ino Darina Sedláková, estrino de la slovakia oficejo de la Monda Organizo pri Sano, alia honoro por la partoprenantoj de la konferenco.
La ĉeestantaj altrangaj salutantoj kaj la kuracistaj gastigantoj ricevis la memormedalojn de la UMEA kiel danksigno de la asocio.
Kadre de la ĉefa konferenctemo estis reprezentitaj 19 prelegoj, 14 en Esperanto kaj 5 en la slovaka. Dank’ al la perfekta laboro de Marek Blahuŝ kaj Marteno Miniĥ, kunlaborantoj de la LKK, konstanta altnivela tradukado de Esperanto al la slovaka kaj reciproke okazis. La medicinista konferenco kaptis la atenton de la amaskomunikilo tiel, ke radio kaj televido intervjuis partoprenantojn kaj raportis pri la IMEK.



*Partoprenantoj dum la 20-a IMEK*



La urbo Nitra el birdoperspektivo

Post la salutvortoj komenciĝis la fakaj prelegoj. Estas menciinde jenaj: D-ro Chr. Klawe (Germanio) parolis pri la medicino kaj tutmondiĝo. Bezonata por la ideala moderna medicinisto estas socia kaj homa konscio, kiu daŭre kaj vigle atentas evoluojn en la tuta mondo. Prof. D-ro W. Opoka (Pollando) kaj D-ro Imre Ferenczy (Hungario) konigis la historion de la ĝisnunaj IMEK-oj kaj prezentis plurajn fotojn. Ili duopoe iniciatis kaj realigis la unuan konferencon en jaro 1977. D-rino O. Szász (Hungario) parolis pri la haŭtmalsanoj kaŭzitaj de sunlumo kaj menciis la preventajn metodojn. D-ro Frank Nitsche (Germanio) prelegis pri la osteo-porozo de maljunuloj. Gravas kiel eble plej interna trejniĝo de multaj muskoloj kaj apliko de sufiĉe da vitamino D kaj kalcio. D-rino Viera Kissová (Slovakio) fakkuracistino de la loka hospitalo konigis la diabetan malsanon kaj la prizorgadon de tiuj malsanuloj. Krome okazis interesaj prelegoj inter aliaj pri la cerebra aneŭrismo, novaj mikroboj kaj pri la Yumeiho-masaĝterapio (fare de Katalin Faragó). Tre aktive kunlaboris kaj prelegis ankaŭ pluraj ĉefkuracistoj el la hospitalo de Nitra. D-ro Ward Kusters (Belgio): „ La ĵuro de Hipokrato en la nuna tempo”. „Medicino kiel ĉio evoluas”. Daŭre aperas novaj testoj kaj novaj aparatoj. Nuntempe la genetikaj analizoj, la mikrocirkvito (ĉipo) kaj la robotĥirurgo staras en la centro de la interesiĝo. De tempo al tempo ni vidas ne nur evoluon sed revolucion. Kiam oni postulis ke ne la dioj sed naturaj influoj provokas malsanojn aŭ ke la miasmo ne ekzistas, sed mikroorganismoj provokas problemojn, la pensmaniero aŭ la modelo por diagnozi kaj kuraci devis ŝanĝi.

Por la aranĝo aperis bone redaktita ilustrita programkajero kun detaloj, salutvortoj kaj fotoj. La ĉeestantoj decidis aranĝi la IMEK-on post du jaroj. La Estraro de UMEA atendas proponojn, kie aranĝi la sekvontan konferencon en jaro 2018.

Tiamaniere sukcesis ne nur laŭ la kongresa ĉeftemo difini la neprajn taskojn, kiujn moderna medicinisto devas plenumi, sed ankaŭ informi la fakan kaj ĝeneralan publikon ekster la Esperanto-movado pri la funkcianta faka agado de esperantistoj. Sukcesis dum la IMEK plekti novajn kontaktojn kaj kunlaborojn, kiuj ebligos daŭran efikan agadon en la estonto.




Katalin Faragó kun la helpantinoj

Reprezentantoj de la UMEA planas renkonti en proksima tempo en Luksemburgio kun Vytenis Andriukaitis, EU komisionano pri sano, informi lin pri la 20-a IMEK kaj diskuti pri kunlaboro kun li, UMEA kaj Europa Esperanto Unio, agado por antaŭenigi fakan utiligon de Esperanto kaj kontribuo al solvado de lingvaj komunikaj problemoj en sansistemo de la Eŭropa Unio.

**D-ro Christoph Klawe**

Kompletigis la artikolon: **D-ro Imre Ferenczy**

# KURACAJ AKVOJ EN HUNGARIO.
**(TRIA PARTO)**

En la antaŭaj du numeroj de nia faka revuo Hungara Fervojista Mondo mi aperigis artikolojn pri la kuracaj akvoj kaj kuracbanejoj en Hungario. Mi ricevis multajn rekonajn opiniojn, laŭdojn kaj proponojn, eĉ instigojn por daŭrigi tiun temon. Intertempe mi legis kelkajn sciigojn pri la kuracbanlokoj, kaj mi surprizite spertis, ke pli novaj kuracbanlokoj konstruiĝis dise en Hungario en la lastaj jaroj eĉ monatoj, kaj servas tiuj la resaniĝon de la malsanuloj. Ankaŭ mi povis konstati, ke la banlokoj ĝenerale konstruiĝis en tiuj urboj aŭ vilaĝoj, kie troveblas fervojlinio kaj stacidomo.



Unu el la plej gravaj partoj de la evoluo de Hungario estas la turismo, ĉefe la „termalturismo”. Ankaŭ mi legis, ke ĉefe eksterandanoj vizitas la hungarajn kuracbanlokojn en la proporcio de 70-80 %. Pro tio okazas ne nur konstruiĝo de novaj banejoj, sed okazas renovigoj kaj pligrandigoj sur tiu tereno. Unu post alia konstruiĝas kurachoteloj, hospitaletoj kaj aliaj konstruaĵoj. Ankaŭ pli alta nivelo de la liveradoj helpas la plifortiĝon de tiu turismo.
En la koro de Eŭropo tiun grandegan naturan trezoron ni devas apreci, kaj sciigi tiun al ĉiuj interesantoj, por eluzi tiujn eblecojn pro la resaniĝo kaj ripozo. Mi proponas al ĉiuj legantoj kaj enlande kaj eksterlande, ke malkovru la kuracbanlokojn en Hungario. Se ĉi tiu artikolserio helpas ion en tiu temo, mi estas tre kontenta, kaj mi pensas, ke tiujn informojn mi ne publikigas vane.
La ceteraj kuracbanlokoj:

## Harkány

La nomon Harkány jam en la jaro 1323 mencias ĉartoj. En 1814 ĝi estis la posedaĵo de la familio Batthyány. Ili malkovris la kuracefikon de la fonto, kiu estis trovebla en sia havaĵo. En 1824 komenciĝis la konstruado de la banejo. Aperis studo pri la banejo kun la titolo „La kuracforto de la termakvo de Harkány”. Oni boradis plurajn putojn, kiuj donas 62 $C^0$ termakvon. La konsisto de la akvo estas alkalia-hidrogenkarbonato, kaj apartenas al la grupo de la sulfuraj akvoj. Ĉefe oni uzas ĝin kontraŭ reumatismaj malsanoj kaj artritoj, eĉ por akcidentaj postkuracadoj. Oni kuracas la „psoriazo” malsanon, faras kardiologian, ginekologian kaj movorganan rehabilitaciojn, reumatologiajn ekzamenojn kaj kronikajn internajn medicinajn kuracadojn. Nuntempe Harkány vivas el la kuracturismo. Multaj hoteloj, apartmandomoj, pensionoj, restoracioj kaj gastejoj atendas la gastojn, eĉ



funkcias en la urbo moderna kaj bone ekipita kuracbanhospitalo. Tiu hospitalo, la kuracbanejo kaj la plaĝo troveblas en la 13,5 hektaraj praparko, kie promenante la malsanuloj ricevas freŝan kaj puran aeron, do alian „terapion”.

## Komárom



La urbo troveblas je 93 km de Budapest apud la rivero Danubo, kaj havas 20 mil loĝantojn. La urbon kunligas fervoja kaj publikvoja pontoj kun la slovaka fraturbo Komarno. En 1965 oni hazarde trovis 64 $C^0$-n kuracakvon, kiu venas el preskaŭ 1300 m profundeco. Utiligi tiun kuracakvon konstruiĝis bankomplekso kun 6 basenoj kaj aliaj priservantaj konstruaĵoj. La kuracbanejo havas novan nomon: „Brigetio”.
La kuracakvo estas 35-38 $C^0$. La bankomplekso ankoraŭ havas naĝejon, deglitejojn, saŭnojn eĉ ŝaŭman banejon kaj travivaĵparkon. La akvo havas multspecajn mineralajn materiojn, i.a. kalcio-magnezo-hidrokarbonaton, kloridon kaj sulfaton. Tiuj estas taŭgaj por resaniĝi la vertebrar-malsanon, artriton, podagron, kaj helpas la resaniĝon post la operacio. La gastojn servas la hotelo „Therminal”, kelkaj pensionoj, apartmanhoteloj kaj aliaj gastejoj. Kompreneble kune kun la restejoj estiĝis kelkaj restoracioj, kaj aliaj priservantaj konstruaĵoj. Ĉar la vojaĝeblecoj al la bankomplekso estas bonaj kaj konvenaj per trajno, aŭtoŝoseo eĉ akvavojo, multaj enlandaj kaj eksterlandaj gastoj vizitas ĝin.

## Balatonfüred

Tiu pitoreska urbo troveblas ĉe la norda parto de lago Balatono. La kuracefikan acidan akvon oni jam konis en la 17-a jarcento, kaj en 1765 konstruiĝis la unua bankonstruaĵo. En la 18-a jarcento ĉi tie jam okazis vigla banvivo, eĉ la kultura vivo ankaŭ grave vigliĝis. Konstruiĝis la unua ŝtonteatro, kaj de tie startis la unua balatona vaporŝipo. Multaj vilaoj kaj ripozdomoj konstruiĝis, kaj Balatonfüred iĝis la hungara centro de la kuracrefreŝiĝo. En la 19-a jarcento konstruiĝis la kuracsanatorio, kiun dum la 20-a jarcento oni plilarĝigis, modernigis, kaj ĝi iĝis internacie konata korsanatorio.

Tie serĉis resaniĝon la mondfama hinda poeto Rabindranath Tagore en 1926. Memore de tiu restado estis nomumita pri li la ĉefa promenejo apud Balatono, kie troveblas multaj plurcentjaraj platanarboj, trankvilo, cignoj kaj anasoj, multaj kaj bele flegitaj floroj, benkoj por ripozi, kelkaj restoracioj k.a.



La kuracakvo estas radioaktiva acidakvo kun alta karbacidenhavo. Multaj kalcio, litio, ferhidrokarbonato kaj glaŭbersalo troveblas en la kuracakvo. Ĉe la puto konstruiĝis pavilono por trinki tiun acidan akvon. Mem la sanatorion oni nomas „Ŝtata Korhospitalo”, kiu donas kompleksan kardiologan rehabilitadon pere de la multflankaj instrumentoj, modernaj maŝinoj, eminentaj kuracistoj kaj flegistoj, efika kuracakvo kaj fizikoterapiaj liveradoj.
Konstruiĝis korsanatorio en la urbo por la fervojistaj malsanuloj, kie post la koratako kaj aliaj kormalsanoj ricevas la malsanuloj zorgadon kaj flegadon.
Antaŭ kelkaj jaroj mi ricevis koratakon, kaj poste mi estis dum tri semajnoj en la fervoja korsanatorio (kiu estas videbla sur la bildo), kaj dank’ al Dio mi preskaŭ tute resaniĝis.

## Egerszalók

La kuracbanloko situas en belega valo proksime al urbo Eger. Tie troveblas la fama salmonteto de Egerszalók, kiu estas la simbolo kaj marko de la „Valo de Kuracakvo”. La 65-68 $C^0$ kuracakvo ŝprucas el 410 metraj profundeco, kaj la deflua akvo konstruis 1100 $m^2$-ojn kalkŝtonajn aluviojn. Tiu natura formiĝintaĵo estas unika vidaĵo, ĉar en Pamukkale, azia parto de Turkio, kaj en la Nacia Parko Yellowstone en Usono troveblas simila formiĝintaĵo en la mondo.
La unuan puton oni boris en 1961, kaj la duan puton en 1987, kaj ili ricevis nomon „Mária” kaj „Vendel”. Ĉe la piedo de la salmonteto konstruiĝis la „Saliris Resort Gyógy és Wellness Fürdő” (vidu la bildon), kiu ekde 2007 akceptas la gastojn. Tiu banejo havas 21 eksterajn kaj internajn basenojn, ok saŭnojn kun du subakviĝaj basenoj.



La kuracakvo enhavas kalcion, magnezion kaj hidrogenkarbonaton, eĉ ĝia sulfurenhavo estas signifa. La meznombra temperaturo de la akvo en la basenoj estas 33 $C^0$. Tiu kuracakvo donas kuracan efikon kontraŭ variaj malsanoj. La kalcio donas inflamemildigan efikon, kaj la sulfuro estas grava elemento de la artika kartilago. La akvo helpas resaniĝi la ginekologiajn kaj movorganajn malsanojn, eĉ ĝi bone kuracas ankaŭ la dartron. La bone klera personaro de la banejo pere de modernaj maŝinoj kaj instrumentoj okazigas la kuracadon. La kuracistoj alvokas la atenton, ke la restado en la akvo estu nur 20-30 minutoj, eĉ kiu havas kormalsanon, ne baniĝas en ĝi, aŭ nur dum

kelkaj minutoj. Antaŭ kelkaj tagoj mi vizitis tiun banlokon, kaj mi ne malatentis la atentigon de mia kuracisto.

## Gyula



Urbo Gyula havas 800 jaraĝon, kaj situas en la sudorienta parto de Hungario, ĉe la pordo de Transilvanio. Gyula estas la „urbo de akvoj", ĉar tiu troveblas en la valo de rivero „Fehér-Körös" kun multaj malgrandaj kanaloj. La simbolo de la urbo estas la gotika brikfortikaĵo, en kiu medio troveblas la fama kastelo Almássy. En la parko de la kastelo konstruiĝis la „Kastelbanejo", unu el la plej belaj banejoj de Hungario.
La kuracbanejo malfermiĝis en 1968, kaj en 2002 okazis plena renoviga laboro. En la jaro 2013 oni malfermis la travivaĵbanejon „AquaPalota", kiu estas la plej bela edeno de la baniĝantoj. Estas populara ankaŭ la plaĝo, ĉefe la 50 metra konkurnaĝejo, kaj la ondobaseno, kie unu metraj ondoj amuzas la partoprenantojn.
La 72 $C^0$-a kuracakvo ŝprucas el 2000-2500 metroj profundeco, entute el sep putoj, kaj ĝi apartenas al la familio de la natria-hidrogena-karbonatkuracakvo. Pro tio ĝi estas grave taŭga por la kuracado de diversaj movorganaj, nervaraj, haŭtaj kaj ginekologiaj malsanoj. En la banejo estas 13 tegitaj kaj 6 subĉielaj basenoj, 12 saŭnoj kaj 5 deglitejoj. El la liveradoj estas plej gravaj la kuracliveradoj (elektro-, mekano-, hidro- kaj balneoterapio). Gravas ankaŭ la diversaj masaĝoj kaj aliaj Wellness-liveradoj.
La urbo havas 9 hotelojn, 7 apartmandomojn kaj unu pensionon. La plej konvena hotelo estas la „Wellness Hotel Gyula", kiu troveblas rekte apud la kuracbanejo.

## Kehidakustány



Kehidakustány estas vilaĝo en departemento Zala, kaj situas en la valo de rivero Zala. La vilaĝo grave evoluis, kiam en 1895 konstruiĝis fervojlinio, sed en la 1970-aj jaroj la ŝtato ĉesis la fervojlinion, pro tio multaj loĝantoj forlasis la vilaĝon. En la fino de la pasinta jarcento la prikonstruado de kuracbanejo kunportis denove la evoluon.
La kuracbanejo havas 2400 $m^2$ akvoebenon kun 13 subĉielaj resp. tegitaj basenoj, 94 metroj longa kaj kelkaj

„kamikaze” deglitejoj. La temperaturo de la kuracakvo estas 49 C$^0$, kiu en la basenoj jam havas 34-36 C$^0$. En la akvo troveblas signifan kalcion, magnezon, hidrogen-karbonaton, kaj la enhavo de sulfido estas alta. Pro tio la kuracakvo estas taŭga por la kuracado de nervaraj, ginekologiaj, haŭtaj kaj movorganaj problemoj. Ĝi ludas gravan rolon en la akcidentaj rehabilitadoj, ĉar ĝi rapidigas la resaniĝon.
En la kuracbanejo funkcias fakkuracista servado, kiu faras terapiplanon kaj poste kontrolon. Ekzistas kuracgimnastiko, subakva masaĝo, peza kaj galvana, eĉ ultrasona terapio. Grave estas, ke la kuracakvo havas bonfareman efikon de la malrapidigita maljuneco.
Al la banejo apartenas tri restejo: „Kehida Termal Hotelo”, „Hertelendy Domo” kaj „Kehida Travivaĵvilaĝo”.

## Lenti



Urbo Lenti situas en la okcidenta parto de Hungario, proksime de la slovena-hungara landlimo. En la jaro 1966 oni faris kelkajn provboradon en la urbo, kaj en la 1200-1500 metroj profundeco ili trovis kuracakvon, kiu havas 56 C$^0$-n, kaj la kvanto de la akvo estas 340 l/sec. La akvo enhavas natrio-hidrogen-karbonaton. Tuj post la malkovro de la kuracefika akvo, komenciĝis la konstruo de la banejo, kiun oni malfermis en 1978. Ekde tiam la banejo kontinue evoluas kaj plilarĝiĝas. Ekzemple nova hotelo konstruiĝis kun 94 ĉambroj, kiu estas kunligita kun la banejo.
La banejo havas kvin subĉielajn basenojn (infan-, naĝ-, travivaĵ- kaj kuracbasenojn), kaj ankaŭ kvin tegitajn basenojn (naĝ-, infan-, kurac- kaj hidromasaĝ-basenojn). En la banejo troveblas ankoraŭ kvar saŭnoj kaj 74 metroj longa deglitejo. La akvatemperaturo estas 25-27 C$^0$, resp. 36-38 C$^0$.
En la tegita banejo funkcias terapeŭtikaj ekzamenoj, kuracadoj kaj masaĝoj. La kuracakvo ĉefe estas taŭga por la kuracado de la movorganaj problemoj, lumbago, artriko kaj inflamaj malsanoj.
Apud la banejo estas la „Sankta Georgo Energiaparko”, kie la promenantoj ricevas kuracefikan radiadon, kaj kune kun la kuracakvo ĝi pli bone helpas la resaniĝon.

## Makó



Urbo Makó troveblas en la suda parto de Hungario, apud la landlimo serba-hungara. Oni nomas ĝin „ĉefurbo de bulbo”. En la jaro 1956 oni boris puton, kaj el 993 metroj profundeco venis kuracakvo kun 41 C$^0$. La akvo enhavas alkali-hidrogen-karbonaton, per kiu ĉefe la reŭmatismajn kaj artritajn malsanojn povas kuraci. Ankaŭ la tie trovebla kuracŝlimo helpas al la malsanuloj, kaj kune kun la kuracakvo siaj efikoj estas pli bonaj, kaj donas kompletan terapion.

La banloko havas diversajn banejojn, kiel la Wellness-banejo, travivaĵbanejoj, plaĝo, infan- kaj infanetbanejoj, saŭnoj, ondobanejoj ktp. Ĉefe la Wellness-banejo alportas la travivaĵon de la ripozo por la familioj kaj gejunuloj. La banloko havas 17 basenojn (dek tegitajn kaj sep eksterajn), el kiuj sep estas kuracbasenoj, kaj kvar estas travivaĵbasenoj.
La novan konstruaĵon de la kuracbanejo planis la mondfama arkitekto Imre Makovecz, kaj ĝi estas la plej bela kaj impona perlo de urbo Makó. La konstruaĵon oni nomas „Hagymatikum" (vidu la bildon), kiun oni ekfunkciigis en januaro 2012. Samtempe de la prikonstruado de la banloko konstruiĝis kelkaj modernaj hoteloj, pensionoj, apartmandomoj. Kompreneble multaj restoracioj kaj gastejoj troveblas en Makó, ĉefe en kaj apud la banloko.

## Mezőkövesd

Pr. je 4 km-oj de urbeto Mezőkövesd troveblas la „Zsóry Gyógy- és Strand-fürdő". La banejo etendiĝas sur 11 hektaraj bele flegitaj parkoj kun 21 basenoj. La tegitaj banejoj havas tri kuracbasenojn kun diversaj temperaturaj akvoj, terapian parton, naĝejon kun granda deglitejo, ŝaŭman banejon, multajn saŭnojn, kaj aliajn priservantajn establojn. La nekovrita parto de la banejo havas naĝbasenojn, travivaĵ-, ondo- kaj kuracbasenojn, eĉ basenojn por la infanoj.



La kuracakvon oni trovis en 1939, kiu venis el 875 m profundeco, kaj donis 3000 l/sec akvon kun 62 $C^0$ temperaturo. Tiu puto momente donas 5000 l/sec akvon kun 68 $C^0$ temperaturo. Pro la granda vizitado kaj la evoluigo de la banejo pretendis la pligrandigon de la akvokvanto, oni boris ankoraŭ tri grandkapacitajn putojn. En 1968 la akvon oni oficiale manifestis „Kuracakvo". La akvo havas kalcion, magnezion, hidrokarbonaton, kloridon kaj sulfuron. La tuta solvita minerala materialo estas 3,5-3,9 g/lit, kiu estas la plej alta valoro en Hungario. Per tiuj mineralaj materialoj la akvo kuracas la inflamon, malgrandigas la sangopremon kaj la kolesterinon, plibonigas la sangoprovizadon de la arterio, kaj pligrandigas la kapablecon de la organismo kontraŭ la malsanoj.

## Szombathely

La urbo estas la rezidejo de  departemento Vas, kaj situas apud la riveretoj Perint kaj Gyöngyös. Ĝi estas la plej malnova urbo de Hungario, kies fondinto estis la romia imperiestro Claudius, kiu prinomis la urbon „Savaria". En Szombathely multaj art-objektoj, historiaj monumentoj, muzeoj, hoteloj kaj restoracioj, kaj kompreneble la kuracbanejo logas la enlandajn kaj eksterlandajn gastojn.

En la urbo troveblas du gravaj banejoj. La „Tófürdő” (Lagbanejo) estas la plej vizitata banejo kun 5 basenoj, 4 deglitejoj kaj aliaj priservadaj ejoj. La alia estas la „Termalfürdő” (Termalbanejo), kiu havas 5 basenojn kaj 2 saŭnojn. La romian etoson de la banejo donas la duonronda kolonaro. La kuracakvon ricevas la banejo el du putoj, kiu havas natrion, kalcion, magnezion kaj hidrogen-karbonaton. La mineralaĵoj en la akvo estas pli ol 2000 mg/l. La temperaturo de la akvo estas 32-34 $C^0$. La kuracakvon oni rekomendas precipe por trinki, ĉar tiu akvo helpas kuraci la dispepsion, gal-malsanon kaj la acidan hipertrofion.



La termalbanejo etendiĝas sur kvar hektara parko en la verda zono de la urbo, kaj havas ankoraŭ tegitan naĝejon kaj modernajn Wellness-liveradojn.

## Csokonyavisonta



Vilaĝo Csokonyavisonta troveblas en departemento Somogy, proksime de la kroata-hungara landlimo. Csokonyavisonta estas specialatmosfera vilaĝo, ĉie troveblas arbarojn, sur la protektata teritorio prakverkaro kaj prajuniperaro. Multaj riveretoj, lagetoj estas en tiu regiono. Ĉi tie oni povas trovi trankvilon, silenton kaj puran aeron.

En la jaro 1943 oni malkovris kuracboradojn kun 73 $C^0$ kuracakvo, kaj ekde 1950 oni utiligas tion. Konstruiĝis kurac- kaj plaĝbanejo, ĉar la akvo enhavas multajn mineralajn materiojn, kiel hidrogenkarbonato, jodido, fluorido, sulfuro kaj metakovacido. La akvon oni rekomendas por helpi la resaniĝon el la gal-malsano, dispepsiaj perturboj, acid-hipertrofio, vertebrara suferigo, ginekologiaj plendoj, haŭtmalsanoj ktp. La banloko havas 4 tegitajn kaj 4 nekovritajn kuracakvajn basenojn, 2 plaĝojn kun du deglitejoj, eĉ saŭnon. La akva temperaturo de la kuracbasenoj estas 35-37 $C^0$, kaj en la naĝejo 24-26 $C^0$.

En la vilaĝo troveblas kelkaj pensionoj, apartmandomoj, kampadejo, gastejoj kaj multaj restoracioj.

**I** **István Gulyás**

# EL FERVOJA MONDO

Aŭstrio: **Nova aŭstra registaro devenas el vicoj de „blua armeo”**

La 17-an de majo 2016 estis kiel registarestro de Aŭstrio elektita sinjoro *Christian Kern,* kiu samtempe rezignis funkcion de plenuma direktoro de Aŭstraj Fervojoj (*ÖBB*), kiun li plenumis ekde jaro 2010. En jaro 2014 li fariĝis ankaŭ prezidanto de internacia organizaĵo *CER* (Komunumo de Eŭropaj Fervojoj kaj direktoroj de infrastrukturo).

Ĉeĥio: **Interesiĝo por transporto de handikapuloj en rulseĝoj kreskas**

Ĉeĥaj Fervojoj (*ČD*) en jaro 2015 plenumis 5297 enregistritajn transportojn de vojaĝantoj en rulseĝoj por handikapuloj, kiuj mendis transporton en trajnoj pere de elektronika sistemo. Tio estas pli multe ol en historio. Ĉiutage krome estas transportataj pliaj nemoviĝeblaj vojaĝantoj sen registrado. En la jaro 2014 estis enregistritaj pli ol 4300 transportoj de handikapitoj en rulseĝoj. Ĉeĥaj Fervojoj pro tio en jaro 2016 enhorarigis rekordan nombron 4656 de handikapul-akceptaj trajnoj de regionaj ĝis ekspresaj.

Ĉeĥio: **Plimultiĝas pasaĝertrajnoj kun klapeblaj revindaj tabloj**

Vojaĝado kun beboj en trajnoj estiĝas ĉiam pli facila. Modernaj pasaĝertrajnoj ricevas aldonajn kupeojn kun klapeblaj revindaj tabloj. Ĉeĥaj Fervojoj tiun ĉi helpil-aranĝon enkondukis ĝis nun jam en 568 pasaĝervagonoj, kiuj priservas kelkmil trajnojn en ĉiu tago. Senobstaklan eniron ankaŭ kun infanĉareto ebligas jam 450 vagonkombinaĵoj aŭ unuopaj pasaĝervagonoj. En tiuj estas fermitaj spacoj por lokado de infanĉaretoj, same kiel en vico da modernigitaj pasaĝervagonoj. Uzon ofertas ankaŭ rezervitaj porinfanaj kupeoj aŭ sidlokoj en 379 longdistancaj pasaĝertrajnoj kaj porinfana kinejo en 38 trajnkursoj.

Litovio: **Memorando pri kunlaboro kun Ĉeĥaj Fervojoj**

Sub patroneco de Ministerio de Ekssterlandaj Aferoj de Litova respubliko okazis la 13-an de majo 2016 en Praga hotelo *Intercontinental* (Ĉeĥio) aranĝo “Litova trafika solvo por ĉeĥaj entreprenistoj”.

Al la partoprenantoj estis prezentataj ebloj de moderna loĝistiko, inkluzive de ebla plia evoluigo de kombinita transporto inter Ĉeĥa respubliko kaj Litovio. En la aranĝo prezentis sin ankaŭ ĉefministro de Litova respubliko *Algerdas Butkevičius;* eblojn de *ČD Cargo* montris prezidanto de ĝia estraro *Ivan Bednárík.*

Post pliaj enkondukaj vortoj de la litova ĉefministro kaj de la ĉeĥa ministro por ekonomio kaj komerco *Jan Mládek* okazis solena subskribo de Memorando pri kunlaboro inter *ČD Cargo* kaj Litovaj Fervojoj. La Memorando celas al establo de komuna laborgrupo, kiu krom reciproka interŝanĝo de datenoj preparos ekspedkontrakton kaj projektojn por evoluigo de internacia transporto, precipe kun trafiksistema distribuo el oriento al okcidento. Ĉefa konsidero estos metata al evoluigo de koridoroj, nome *RFG 8,* pli granda alligo de marhaveno *Klajpeda* kaj moderna transkargejo en *Kaunas*. Oni kalkulas ankaŭ kun propagandaj pakoj, kiuj koncernas vartrafikon sur fervojo inter landoj de cela merkato tra Litovio kaj Ĉeĥa respubliko. Estas celata kunlaboro ankaŭ en sfero de plia agado, kiu estas kongresoj, foiroj, seminarioj kaj komercaj renkontiĝoj. Tre interesa influzono estas transportdeturnado de sterkaĵoj de ŝoseo al fervojo – haveno *Klajpeda* estas jam historia pordego al Eŭropo por tiu ĉi kategorio de varo.

En lastaj kvin jaroj okazis signifa evoluo de trafiko en baltmaraj landoj. Okazas vasta modernigo kiel de veturilaro, tiel ankaŭ en infrastrukturo. Al la plej konataj projektoj apartenas al t.n. *Rail Baltica,* per kiu okazos rekta kunligo de Varsovio kun Talino sur fervojlinio kun „normala“ ŝpuro 1435 mm. Entuta longo de la nova kunligo atingos 930 km-ojn. Plena ekspluatapertigo de la linio estas planata por jaro 2030. En kadro de ŝpararanĝoj okazas modifo de la plano: anstataŭ konstruo de tute novaj liniosekcioj estos en iuj partoj modernigo de linioj jam ekzistantaj, kaj instalata duala ŝpuro. Tiel okazas ekzemple ĉe jam ekzistanta fervoja liniosekcio el pola-litova landlimo al *Kaunas*.

En *Kaunas* estas konstruata moderna terminalo, al kiu estos en jaro 2018 fervojlinio kun normala ŝpuro alligata. Litovaj Fervojoj de la indikitaj paŝoj promesadas al si kreon de alternativo de transkargejo en *Brest*. Por novaj klientoj oni batalos ankaŭ kun helpo de novaj informsistemoj, kaj promesas plenumi transdonadon de vagonaroj ĉe belorusa landlimo dum 30 minutoj. Nur sur menciita fervojlinia parto al *Kaunas* jam estas investitaj 300 milionoj da eŭroj, sternitaj 127 km da trakoj kun normala ŝpuro kaj modernigitaj 106 km da trakoj kun ŝpuro 1520 mm.
Alia elstara projekto estas kreo de t.n. Nordmara-balta varfervoja koridoro (*RFC 8*). Tiu ĉi koridoro kunligas ses landojn (inkluzive de Litovio kaj Ĉeĥa respubliko), kaj ankaŭ ses eŭropajn havenojn (*Wilhelmshaven, Bremerhaven,* Hamburgo, Amsterdamo, Rotterdamo, Antverpeno). La koridoro kovranta pli ol 6000 km da fervojlinioj, estas en ekspluatado ekde novembro 2015.

Pollando: **Polaj rapidtrajnoj „*FLIRT*os"**
Pola trafikisto *PKP Intercity* ekde nova horaro por jaro 2016 daŭrigas renovigadon de siaj rapidtrajnoj. Post entrafikigo de grandrapidaj trajnoj *Pendolino* en jaro 2014 ĝi ekde jaro 2015 fieriĝas per novaj rapidtrajnaj motorvagonkombinaĵoj *FLIRT 3, DART* kaj dizelaj lokomotivoj *GAMA*.
La kompanio *PKP Intercity* mendis dudek kombinaĵojn de la plej nova generacio el familio *FLIRT 3* en novembro 2013 ĉe konsorcio de la kompanioj *Stadler* kaj *Nawag.* La firmaon *Stadler* reprezentis en fabrikado ĝia pola entrepreno en *Siedlce*, kio estas sur fabrikaj markoj emfazita. Ankaŭ multaj aliaj komponantoj devenas rekte el Pollando de diversaj partneroj. Valoro de la kontrakto inkluzive de bontenado por 15 jaroj estas 1,6 miliardoj da zlotoj.

**Kvar linioj tra Pollando**




La vagonoj estas ekipitaj de ĉiu nuntempe kutima komforto. Internaĵo estas klimatizita, tualetejoj estas kun fermita sistemo kaj unu vagono de la kombinaĵo taŭgas por handikapitoj. Memkomprenebla estas nun klapebla tablo por revindado de suĉinfanoj. Por informado de vojaĝantoj servas moderna aŭdovida sistemo kun serio de monitoroj sur diversaj lokoj en la trajno. Ne mankas *wi-fi*-konekto al Interreto.
La trafikisto volas *FLIRT*-ojn entrafikigi sur siaj longdistancaj linioj trans tuta Pollando. Temas pri linioj Varsovio – Krakovo – *Toruń – Bydgoszcz* (290 km), *Olsztyn* – Varsovio – *Kielce* – Krakovo (551 km), *Gdynia – Bydgoszcz – Kutno – Łódź – Częstochowa – Katowice* (655 km) kaj Krakovo – *Miechów – Opoczno – Łódź – Kutno – Konin –Poznań – Szczecin* (734 km).
Ĉiu el okvagonaj kombinaĵoj ofertas entute 360 sidlokojn, el tiuj 60 en unua klaso. Ĉi tiuj estas lokitaj en unua kapa kaj apuda vagonoj. Sekvas vagono por pasaĝeroj sur rulseĝoj kaj kun bufedokupeo, en kiu troviĝas pliaj ok sidlokoj. Kvara ĝis oka vagonoj ofertas sidlokojn en dua klaso. Meze de la vagonkombinaĵo en unu vagono estas ankaŭ spaco por bicikloj kaj bagaĝoj pli grandaj. Sidiloj en unua klaso estas lokitaj unu kontraŭ la alia kun tabloj kaj baskulklapoj, dum en dua klaso troviĝas sidiloj kaj unu post la alia kiel el aviadila aranĝo, kaj unu kontraŭ la alia.

***Flirt* kun alta planko**
En versio por *PKP Intercity* por longdistanca trafiko estis elektita nekutima solvo kun planko

en alto 1180 mm super relsupronivelo. En tuta vagonkombinaĵo tiel estas planko en sama nivelo. Tio koincidas ankaŭ kun plialteco de multaj pasaĝerkajoj en Pollando, ol aliloke kutimaj 550 mm. Sur ambaŭ flankoj troviĝas po ok enirpordoj.



Okvagonan kombinaĵon konsistigas du kvarvagonaj sekcioj, havantaj en kapo trakcian boĝion kaj en fino, kie ambaŭ sekcioj kuntuŝiĝas, estas normala boĝio netrakcia. La aliaj boĝioj konformas al konstrukciaĵo *Jakobs* kaj portas ambaŭ najbarajn vagonkestojn. Tuta veturilkombinaĵo - kvankam ok vagonoj - longas nur 152,9 metrojn. En ekspluatado do povas esti kunligitaj eĉ du kombinaĵoj en unu vagonaro. Rapidan kupladon kaj malkupladon ebligas aŭtomataj kupliloj.

Ĉar oni planas ekspluatadon de veturiloj *Flirt PKP Intercity* nur en enlanda trafiko, ili estas konstruataj kiel unusistemaj por en Pollando uzata trakcia sistemo 3 kV kontinua tensio. Nur du trakciaj boĝioj donas al vagonkombinaĵo konstantan povumon 2000 kW, sed kurttempe ili povas atingi povumon ĝis 3000 kW, kaj maksimuman rapidon 160 km/h. Akcelo de la trajno estas 0,6 m/s². Danke al vagonkesto el aluminiaj profiloj, maso de la tuta kombinaĵo estas nur 257 tunoj, do radaksrilata maso nur 13 tunoj. Sekurecon de trajnveturo gardas trajnsekuriga sistemo *ETCS* - apliknivelo 2 - kaj pola sistemo *SHP*.

Kvalitajn deĵorkondiĉojn ricevas ankaŭ trajnpersonalo. En vagonkombinaĵo estas memstara kupeo por trajnestro kaj sian socialan instalaĵon havas ankaŭ priservantoj de bufedo. Tiu ĉi estas ekipita per memstaraj tualetejo kaj duŝilo.

Por alta persona sekureco de vojaĝantoj kaj priservantoj helpas envagona kamersistemo.

Tiuj motorvagonkombinaĵoj por *PKP Intrercity* estas plia ekzemplo pri adapto al longdistancaj trajnkursoj.

Slovakio: **Novaj veturiloj en bontenadservo**

Kvar novajn veturilojn ricevis riparistoj en etbontenejoj por vagonoj en *Bratislava, Žilina, Zvolen* kaj *Košice*. Danke al tiuj veturiloj bontenistoj povas kontroli trakveturilojn rekte en servo ekspluata kaj forfalas tiel bezono transporti trakveturilon en bontenejon. Avantaĝo tiel estas precipe rapideco kaj mallongigo de tempo bezonata por restado de trakveturilo en bontenejo. La mobilaj servoj estas uzataj ĉe eltrajnigo de vagonoj, interŝanĝo de radaksoj kaj boĝioj, riparoj kaj bremsprovoj, same kiel ĉe sekurecinspektadoj rezultantaj el kontrakto kun filia kompanio *Cargo Wagon, a.k*.

Svisio: **Tunelo sub montpasejo *Gotthard* en ekspluatado**

Merkrede la 1-an de junio 2016 estis inaŭgurita trafiko en la nova *Gotthard*-tunelo, la plej longa fervoja tunelo en la mondo. Solenan aranĝon partoprenis reprezentantoj de multaj fervojaj kompanioj kaj honoraj gastoj. Kostoj por konstruado de la tunelo atingis 13 miliardojn da svisaj frankoj, kaj ĝia konstruado daŭris 17 jarojn. La nova linio reduktos veturtempon inter Zuriko kaj Milano je ĉirkaŭ unu horo. Karakterizan pligrandigon de kapacito en nordsuda direkto ĝi ebligas ankaŭ por vartrafiko – dimensio estos ĝis 260 vartrajnoj en tago. Regula trafikado estas planata por decembro 2016.

Preparis: **Jindřich Tomíšek**
Reviziis: **Heinz Hoffmann**







**La 69-a kongreso de IFEF okazos de la 16-a ĝis la 23-a de majo 2017 en Francio, Alzaco, en la urbo Colmar. Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de HFEA.**